

-----  
Monata informilo de Sovetlanda Esperantista Movado  
-----

"ORA SUNO"

Ĉi somere en Uzbekio estis organizita la IV-a studenta E-konstruataĉmento "Ora suno". Ĝin organizis Taŝkenta E-klubo ĉe Taŝkenta ŝtata universitato. La taĉmenton partoprenis 52 gejunuloj (inter ili 32 knaboj) el 15 lokoj de Sovetunio. Por komenco iom da statistiko: la plej juna knabo en "Ora suno" havis 16 jarojn, la plej juna knabino - 18 jarojn, la plej aĝa knabo - 30 j., la plej aĝa knabino - 25j. Meza aĝo de batalantoj - 19 jaroj. La taĉmento estis vere internacia, ĉar ĉi tie estis reprezentitaj rusoj, ukrainoj, latvoj, litovoj, uzbe-koj, taĝikoj, tataroj, avaroj, tatoj, lezginoj.

La laborloko troviĝis 380 km for de Taŝkento, laboro - betonigo de kanalo en Kaŝkadarja regiono. Homoj ĝojis, kiam vidis helpantajn gejunulojn, kiuj venkas varmegon per vireca, ŝvita laboro. Ĉi tie de frua tagiĝo ĝis la sunsubiro laŭte sonis simfonio de laboro. Sindoneme laborintaj de la 10-a de julio ĝis la 20-a de aŭgusto, la fortikaj gejunuloj efektivigis laŭdindajn aferojn. La tuta taĉmento estis dividita je kvar brigadoj, kaj ni laboris po 8-10 horoj kax ĉiutage.

Kio estis interesa en "Ora suno" krom ĉeflaboro? Multaj esperantistoj kun plezuro okupiĝis pri sporto, muziko, lernado de novaj kantoj kaj certe - Esperanto. 3-foje semajne funkciis E-kursoj por komencantoj kaj komencantinoj. Bedaŭrinde, partoprenis ilin ne ĉiuj taĉmentanoj, al kiuj ili estis nepraj kaj utilaj. Dum la tuta periodo estis organizitaj KGS (klubo de gajaĵ kaj spritaj), konkurso de lingvistikaj ludoj, gaja vespero, festo de naskiĝintoj, ŝakkonkurso (en kiu la 1-an lokon okupis V. Krikun el Ufa kaj estis solene premiita per libro de B. Lavrenev "La kvardekunua"). Dum unu el la ripoztagoj okazis ekskurso al montaro, kiu impresis ĉiujn. La agitbrigado ofte prezentis interesajn koncertojn (ruslingve, en Esperanto, alilingve) en proksimaj SKT-oj kaj en PMK mem. La prelego pri fruktoriča, kontrasta Uzbekio, kantaĵ vesperoj ĉe lumo de lignofajroj, ekskursoj al la plej antikva urbo de ĉi respubliko - Samarkand, naskiĝurbo de Timur Ŝaĥrisabz, restis por ĉiam en nia memoro. Dank' al la klopodoj de reprezentantoj el kelkaj urboj estis faritaj sekvaj stendoj: "Arkitektaj monumentoj de Uzbekio", "Ivanovo - urbo de la unua Soveto", "Tula", "Dagestano - monta lando", "Juvela arto de Dagestano", "Fotostando pri ESKT-3 kaj la historio de ESKT-oj". Ĉiujn niajn novaĵojn, malfacilaĵojn, alvokojn, humoraĵojn reprezentis murgazetoj, regule eldonitaj de la taĉmenta redakcio ("Esperreto", "Plena stomako", "Mi volas betoni", "La Konstruist", "Aŭtuna humoro"). Ĉiuj stendoj, murgazetoj, batalfolioj, laborbultenoj ktp. estis eldonataj en Esperanto. Tio multe helpis al la komencantoj en la lingva perfektigo.

Tamen granda parto de la partoprenintoj tute nek parolis, nek komprenis la lingvon kaj ĉe ne vizitadis la E-kursojn. Mi opinias, ke tio estas kulpo ne nur de la taĉmenta estraro, sed unue de la gruprespondeculoj kaj SEJM-reprezentantoj, kiuj subskribis la aliĝilojn. Eĉ respondeculoj pri grupoj (Tula, Maŝaĉkala, Birska) ne povis kunligi du vortojn, ne partoprenis mem la E-konkursojn kaj ne devigis siajn grupanojn. Ĉiu partoprenonto almenaŭ devas esti fininta elementan kurson. Spertaj esperantistoj laŭ mia malnova opinio devas formi 10-15% de SKT, same - la neparolantoj en Esperanto.

Multajn malfacilaĵojn havis ni ĉi jare de esperanta flanko. Eĉ ne unu klubo alveturigis E-jurnalojn, librojn, gazetojn. La Taŝkenta klubo enkaŭ malmulte helpis per ili. Sondiskojn, surbendigitajn kantojn, lecionojn ni havis, sed E-literaturon kunveturigis nur kelkaj entuziasmuloj.

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, varmega vetero, nefavoraj de tempo al tempo kondiĉoj, mi povas konkludi, ke ĉi jare la ESKT sukcesis, ĝi estis la plej riĉenhava kompare kun la pasintjaraj E-studentaj taĉmentoj. De jaro al jaro nia ido kreskas, dones pli grandan utilon ol la ordinaraĵoj studentaj taĉmentoj kaj laŭgas neripetebajn impresojn en la vivo de ĉiu esperantisto. Generale perlaboro en ĉiuj ESKT ne estas riĉa. Sed E-taĉmentanojn tio ne timigas; ekzistas veteranoj, kiuj partoprenas ĝin 3-4 foje. Kio allogas ilin? Certe ne mono. Cefa kaŭzo ĉi tie - la atmosfero, kiu regas en laborbrigado, aromo de amikeco, interhelpo, preteco ĉiam helpi al sia amiko, deziro labori ne nur per manoj, kredo je komuna ideo...

21  
ant  
Kas  
Sak

Multe dependas de lokaj kondiĉoj, tamen la sperto montris, ke ESKT-oj ĉe universitatoj, institutoj sukcesas pli bone ol regionaj. Certe labori en ĝi necesas iom pli streĉe ol en la regiona, tamen aliĝo al instituta stabo de SKT-oj faciligas serĉadon de laborobjekto, interkonsenton kun konstruorganizaĵoj kaj krome, la universitato elspezas sian propran monon por organizaj klopodoj. (Tio estas grave).

Pripensinte la rezultojn kaj sperton de organizado de pasintjaraj ESKT-oj oni povas konkludi:

- 1) Varbado de dezirantoj devas komenciĝi ne pli malfrue ol januare-februare;
- 2) Kvanto de knabinoj - ne pli ol 10 inter 50-55 getaĉmentanoj;
- 3) Granden valoron havas sano de ĉiu partoprenanto. Medicinkarto konforma al sanstato de betalanto (Estis multe da akcidentoj pro tio ke venadis ne tute sanaj geknaboj).

Prepara stabo de ESKT

- 1) Oni elektu respondeculon pri sekvanta ESKT dum SRJM-Konferenco, li povas esti samtempe komandanto. La komandanto havas okupejn similajn al simpla SKT, tial konsultiĝu li en la regiona, universitata aŭ distrikta stabo de SKT-oj, kie estas registrite ESKT.
- 2) Komisaroon elektu dum labora periodo, konatan kun socia laboro en SKT-oj, spertan esperantiston. Dum prepara periodo estu homo, kiu faros komisaroon laboron antaŭ komenco de laboro mem.
- 3) Majstro estas tre grava persono en taĉmento! Preferinde ke li estu ano de ESKT. De li dependas sukceso de la tuta laborperiodo (Eblas elekti lokan homon, sed rilatu li bone al studentoj kaj ESKT).
- 4) Dum prepara periodo nepre estu respondeculo pri medicino. Preparu li medicinon kuraterminaron en Esperanto.
- 5) Komisaroo preparas ĝeneralan planon de agitsocia laboro kaj krom tio, planon de intertaĉmenta laborok kaj kunlaboro kun loka komsonola organizaĵo. Li elektas respondeculojn pri:
  - a) E-metodika fako, kiu korespondas kun gvidantoj de E-kursoj. Preparu programon de instruado por 1-1,5 monatoj, 2-3foje semajne kaj ĉion necesan por E-kursoj (lernolibrojn, sonbendojn KTF)
  - b) sporta fako, kiu korespondas kun partoprenantoj por ke ili prenenu sportilojn. Preparu sportterminaron en Esperanto.
  - c) ekskursprelega fako - preparu ekskursojn, kolektu prelegojn diverstemajn ne nur en Esperanto, sed lige kun ĝi.
  - d) muzika fako - kolektu E-kantojn, sondiskojn, magnetofonbendojn, preparu programon de agitbrigada laboro (laŭ temaro). Petu partoprenantojn kunpreni gitarojn, artnumerojn, danckostumojn ktp.
  - e) fotokino-fako - laŭ bezono kaj lokaj ĝ kondiĉoj.

Gravaj malfacilaĵoj dum prepara periodo.

- 1) Multaj kluboj ne havas informon pri ESKT. (Se ĝi aperas en "Aktuale", necesas dissendi al ĉiuj kluboj kaj grupoj, ĉar pro manko de dezirantoj maje-junie taĉmento riskas fiaski).
- 2) E-kluboj tro malfrue sendas aliĝilojn kaj ne povas garantii ĉu iliaj klubanoj venos ESKT-on aŭ ne. (Pro tio mem organizantoj devas serĉi anstataŭantojn komence de julio!).
- 3) Ne sufiĉa scio de la lingvo kaj konstruprofesioj anstataŭ memlaŭde aliĝiloj. (Skribu nur veron).
- 4) Elekton de batalantoj efektivas diversaj homoj kaj kriterio tial estas diversa. (Komprenu celon de niaj ESKT-oj!)

Labora periodo

- 1) Elektu brigadestron el la plej spertaj SKT-anoj. Pli bone el fari poste reelekton.
- 2) Elektu konstante proviziston (intendanton) kaj kontrolan komisionon. (Nepre!)
- 3) Nepre trovu superfluan laboron, se konstanta laboro ne sufiĉas aŭ ne povas esti bone organizita pro manko de organiza sperto ĉe stabo aŭ foresto de materialo.
- 4) Organizu firman kontrolon pri livero de materialo al objekto mem, ne esperante al estraro de regiona aŭ distrikta stabo, kie estos registrita ESKT.
- 5) Avangardo veturu antaŭ 3-4 tagoj por prepari loĝejon, manĝejon, kuirejon, banejon ktp.
- 6) Estu nepre RVA (ruĝverda anguleto). Dezirinde ke en ĝi estu:
  - a) murgazeto de ESKT;
  - b) ĉiutaga batalfolio (aŭ laborfolio) pri mem laboro, pri E-laboro kaj fakoj;
  - c) Libera tribuno;
  - d) Anencanguleto;
  - e) anguleto de sendanĝero;
  - f) temaraj ekspozicioj, novaĵoj, interesaj artikoloj;
  - g) E-biblioteko, konstruiterminaro.
- 7) Nepre skribu taglibron de ESKT kun fotoj, desegnaĵoj ktp.

Postlabora periodo.

- 1) Skribu ĝeneralan reporton al universitata, regiona aŭ distrikta stabo de SKT-oj (al E-klubo, kiu organizis ESKT-on kaj al respondeculo pri sekvanta taĉmento aŭ klubo). (Komandanto, komisaro kaj kuracisto).
- 2) Solene fermu ESKT-on laŭ niaj tradicioj. Ĉiujn dokumentojn, flagojn de ESKT (pasintjarajn ankaŭ) antaŭ ĉiuj ESKT-anoj solene transdonu al sekvanta respondeculo pri ESKT. (Aŭ pli bone al fakestro de SEJM).

Smetanina Svetlana  
( Ivanovo ).

SCIENC-ESPLORA INSTITUTO DE ESPERANTO.

Esperantistoj de nia lando ofte plendas ke Esperanton kiel lingvon oni oficiale ne subtenas en nia ŝtato. "Aŭ, kia bela lingvo estas Esperanto, riĉa, multtreva ktp." - parolas ni, sidante en iu oficiala kabineto. Sed krom vortoj kaj deko da E-revuoj nenion ni povas prezenti. Mi aludas tion ke en la epoko de scienc-teknika revolucio niaj ŝtat-viroj tute prave rigardas absolute ĉiujn temojn tra scienca prismo. Rigardu oni tra scienca prismo al Esperanto kaj ekvidos oni nudan lokon. Mi ne prenas la tutmondan skalon en kiu oni faris jam pli-malpli da sciencaj analizoj, favoraj al Esperanto. Sed ~~forestoj~~ ili forestas en la rusa lingvo, kaj niaj gvidantoj ja ne legas en aliaj lingvoj, des pli en Esperanto.

Do, ni ne havas verkojn, kiuj science pruvus utilecon de Esperanto. Turniĝas ni en sorĉita rondo: oni ne subtenas, ĉar ne vidas sciencan pruvon, ni ne studas science ĉar oni ne subtenas, do ne donas eblecon. Rompi tiun rondon devas ni, esperantistoj, kaj je kosto de nia entuziasmo. Nome, ni devas en la proksimaj (mi diru 3-5) jaroj fari aronda sciencaj studoj, pruvantaj la egan utilon, grandan valoron de Esperanto kaj en la nuna tempo kaj des pli en la proksima estonto.

Ni bezonas homojn, kiuj dediĉus sin al solvo de la prezentata problemo. Por unuigi tiujn homojn en unu kolektivon estas fondata sur la socia bazo Scienc-Esplora Instituto de Esperanto. Labori en tiu kolektivo povas ĉiu homo, kiu serioze rilatas al la afero. La seriozecon ni facile kontrolos: ni donos temon por prilaboro kaj post jaro jam estos ĉio evidenta. Temojn, prilaborendajn unuavice, ni kolektas.

Kiel ekzemplo:

- 1) Rolo de Esperanto disvastigi sciojn pri Sovetunio en la 20-30-j jaroj.
- 2) Kiom sparus la mondo kaj aparte nia lando se akceptus Esperanton kiel internacian lingvon (ekonomiko)
- 3) Esperanto - jam vivanta lingvo
- 4) La esprimebleco de Esperanto ne cedas (aŭ superas) tiujn de naciaj lingvoj
- 5) Filozofia valoro de Esperanto ~~xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx~~  
~~xx xx xxxxxx yyyyyyy~~
- 6) Rolo de Esperanto en la internaciisma edukado de la Soveta junularo
- 7) Enkonduko de Esperanto en lernejon permesas a) liberigi multon da tempo por lerni aliajn lernobjektojn;  
b) al gelnantoj plene ekposedi alian (ol la gepatra) lingvon
- 8) Esperanto povas esti ne nur komunikilo de pac-batalantoj, sed edukas junularon ĝuste en spirito de paco kaj amikeco interpopola
- 9) Esperanto estas sola rimedo forigi la multlingvecon en scienca informado.

Nun pasas organiza periodo de Scienc-Esplora Instituto de Esperanto.

Organizan komitaton gvidos k-do Tokarev Boris Vladimiroviĉ al kiu mi petos vin sendi viajn konsiderojn pri la temo (103001, Moskvo, ul. A. Mickeviĉa 10-6).

A. Gonĉarov.

BRE TUTLANDA E-KATALOGO.

En diversaj bibliotekoj de nia ~~landa~~ granda lando troviĝas multaj libroj pri Esperanto kaj en Esperanto. En Esperanto ekzistas ne nur belarta literaturo, sed ankaŭ teoria, politika. Ĉu oni uzas ĝin por laboro, por E-propagando, por plenumo de siaj scioj? Pli ofte - ne, ĉar multaj homoj eĉ ne supozas pri ĝia ekzistado.

En decidoj de la VIII-a SEJM-Konferenco estas skribite: per solvi sur scienca bazo aktualajn problemojn de Esperanto iniciati kreen de Scienc-esplora Instituto de Esperanto. Ankaŭ estas decido de SEJM-Komitato organizi E-Universitaton. En tia universitato oni studos historion, konatiĝos kun E-literaturo ktp. En la fino de la universitato okazos ne nur ekzameno, sed ankaŭ diplomlaboro. De kie preni materialojn? El lecionoj kaj el libroj. Sed el kiaj libroj? Kie ilin trovi?

Jen, ĝuste por tia celo povas esti taŭga farata tutlanda E-katalogo. Tie vi ne nur trovos necesan libron, sed ankaŭ ekscios, en kia urbo ĝi troviĝas kaj ĝian ĉifron.

Plimulto de la libroj estas ne tre grandaj - ĉirkaŭ 20 paĝoj. Do, vi povas mendi mikrofilmon kaj krei ĉu en klubo, ĉu en urba biblioteko propran E-bibliotekon sed el mikrofilmoj.

Tie utilaj estas ankaŭ libroj por komencantoj - sur unu flanko rusa teksto, sur la alia - la sama, sed en Esperanto. Ĉu vi scias, ekzemple, ke tiamaniere estas eldonite "Vorto pri regimento de Igorj"?

Nun mi petas klubojn helpi al mi en tiom granda kaj grava laboro.

Al 1-a de marto mi volus havi jam rusan parton, al la 1-a de majo aŭ eĉ iom pli frue - esperantan kaj alilingvan.

Memoru, ke mi faras ne nur alfabetan katalogon, sed ankaŭ sisteman katalogon kaj tio postulas multe da tempo.

Ankaŭ mi petas ĉiujn, kiu scias pri ies bibliografia laboro - skribu al mi ĝian titolon. Mia celo ankaŭ estas kolekti titolaron de diversaj E-bibliografiaj laboroj jam faritaj aŭ farataj.

Ĉiujn dezirantojn kunlabore mi petas skribi al mi laŭ adreso: 197137 Leningrad, Ĉkalovskij 60 - 91,

Cvetkova Valerija.

#### Vespero de internacia amikeco.

24-an de novembro en Novosibirsk en NIIGAIK okazis Vespero de internacia amikeco, kiu fariĝas lastjare jam tradicia en la instituto. La Vesperon organizis geesperantistoj de Novosibirska E-klubo kaj studentoj de la instituto sub gvido de k-do Sibircev. En la programo de la Vespero estis: 1) Rakonto de N. Januleviĉ (Omsko) pri la E-Kongreso en Ĥ Jugoslavio;

2) komunikoj pri Berlina Junulara Festivalo;

3) Rememoroj de gestudentoj kaj instruistoj pri veturoj eksterlanden;

4) koncerto. Bedaŭrinde pro malsano de respondeculoj la 1-a kaj 2-a punktoj ne estis plenumitaj.

La halo, kie okazis la entrepreno, estis ornamita per diverslingvaj sloganoj, inter ili estis ankaŭ esperantaj. Dum la vespero oni havis plezuron rigardi murgazeton kun kelkaj E-artikoloj, dediĉitan speciale al la festo, aŭskulti litovajn estradajn kantojn en Esperanto.

La Vesperon partoprenis grupo de geesperantistoj el Barnaul. Ili preparis negrandan koncerton, kiu eniris la ĝeneralan koncerton kiel "esperantista parto".

Sekvinttage la barnaulaj geesperantistoj rigardis privatan bibliotekon de k-do Sibircev, konatiĝis kun materialoj klarigantaj la fiaskokialoj de Novosibirska SEJT, partoprenis kunvenon de Novosibirskaj E-klubo kaj konatiĝis kun E-libroj en la regiona biblioteko.

Ni varme disiĝis, firme decidinte daŭrigi reciprokajn amikajn vizitojn inter niaj kinurboj. V. Ebelj (Barnaul)

Kujbiŝev.

En lokaj gazetoj estis presita pri Esperanto:

- a) La 15-an de oktobro en uzina gazeto "Znamja truda" artikolo "Lernu Esperanton" de Z. Skvorcova.  
b) La 16-an de novembro en "Kujbiŝevskaja nedelja" anonco pri E-kurso ĉe urba junulara klubo.  
c) La 27-an de novembro en vespera gazeto "Voljskaja Zvezda" artikolo "Lingvo de amikeco" de Z. Skvorcova (Rim. de red.: la artikolo estis multe ŝanĝita kompare kun aŭtera teksto.)

Nun en la urbo funkcias tri E-kursoj. En Kulturpalaco "Stelo" (10 personoj) gvidas S. Ivanova. En filio de 4 globlagra uzino (12 personoj), gvidas laboristo de la uzino N. Ovčinnikov kaj en urba junulara klubo (20 personoj) gvidas Z. Skvorcova (helpas M. Krjarova).

Z. Skvorcova  
(Kujbiŝev).

\*\*

\*\*

\*\*

\*\*

Materialojn por "Aktuale" sendu: 656099, Barnaul-99, a.k. 11,  
Esperanto-klubo.

Redaktis Ju. Vladimircov;  
Tajpis N. Stolbun.

S C I I G O J

O m a k .

En E-rondetoj de la urbo lernas ĉirkaŭ 40 homoj.

B a r n a u l .

En la urba tipografio estas presita kolora E-afiŝo en la kvanto 500 ekz. Libera kvanto estos distribuata inter SEDM-kluboĵ (diverskvante) laŭ rezultoj de socialisma konkurado por periodo 1/VII - 31/XII 73 jaro. Kiu ne sendeĝas al la sekretario raporton por tiu periodo ricevos nur po unu specimento.

9-10 de februaro Barnaula E-klubo festos sian 10-jaran jubileon. Estraro de la klubo kore invitas al la festo ĉiujn, kiuj povas veni Barnaulon.